5-a Jaro. N-o 226 APERAS  SEMAJNE 29. Januaro 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

LA MINACO DE HINDIO

La Haveno de Bombe (angle: Bombay) similas laŭ multaj rilatoj al la haveno de Londono. Tie la samaj ŝipoj ankradas: ŝipegoj el ĉiu mondparto, multaj venintaj el Britio. Ĉeestas la konataj vidaĵoj kaj sonoj kaj odoroj de haven-vivado, la okupateco, la bruo, la ekkrioj de l' fajfilegoj, la grincado de ŝarĝ-leviloj, kiuj elsvingiĝas de l' varejoj, la svarmoj da doklaboristoj, kiuj moviĝas kaj rapidas ĉe la ŝipoj kaj dokoj — kiel armeoj de formikoj plenumantaj herkulesajn taskojn — ŝarĝantaj kaj malŝarĝantaj. Tio memorigas, kiel mi jam diris, pri la vivado ĉe la Londonaj dokoj[1], en febre varma kaj brile suna somera tago — kun sennuba blua ĉielo super la kapo el kiu haŭtbruliga suno radias varmegon. Sed ekzistas tamen diferencoj, kiuj sin trudas sur la konscion laŭgrade. Ekzistas ekzemple la odoroj de l' Oriento. Sed tio, kio atestigas plie pri Bombe, anstataŭ pri Londono, estas, ke ĉiuj el la dokistoj estas brunhaŭtaj anstataŭ blankhaŭtaj. La laboristoj en siaj turbanoj kaj 'dhoty'oj[2] konsistigas la plej diferencan elementon en la sceno. Tiu strangeco trafas plej vive. Kiam oni renkontas aron da laskaroj[3] en la nebula malhelo de Limehouse[4], inter la grizaĉaj stratoj de Londono, tio ŝajnas strange.

Ĉi-tie, do, ĉe la marbordo de Bombe, estas parto de l' laboranta Hindio. La dokistoj de Bombe faras similajn deĵorojn kiel la dokistoj en Londono aŭ Liverpul. Ili faras la deĵorojn kun simila energio kaj sperto, alĝustigantaj, siajn korpojn por portado de similaj ŝarĝoj. Iliaj laborhoroj estas kutime de l' 7-a matene ĝis la 17-a posttagmeze, kio signifas, enkalkulante tempon por manĝi, ke ili laboras proksimume naŭ horojn potage. La salajro de dokisto estas £ 1, 7 s. pomonate, aŭ 1 s. 9½ d potage[1]. Nur proksimume 1 penco pohore estas pagata por kroma labortempo. Flanke de la dokistoj dungitaj, svarmas senlaboruloj. Estas taksite, ke neniam pli ol unu triono el la dungebla dokistaro povas trovi laboron.



Antaŭe la kabanaĉoj, en kiuj devas loĝi hindaj laboristoj. Malantaŭe — nova fabrik-konstruo, por kiu mono ne mankas.

1 Komerca havenbaseno.
2 Dhoty (esp.: dhoti): korp-tuko.
3 Laskar: hinda aŭ azia maristo.
4 Limehouse (esp.: Lajmhaŭs): kvartalo doka de orienta Londono.

Londona dokisto ricevus salajre por du tagoj da laboro tion, kion ricevas dokisto de Bombe por unu monato.

Mi skribis ĉi-tie pri Bombe, ĉar tiu haven-urbo estas la unua trafita, la pordego al Hindio. Ĝi unue viciĝas kiel elmontro pri Hindio kaj hindaj kondiĉoj.

"Hejmoj"

Ni povus sekvi la londonan dokiston al ties malgaja hejmeto en Ŝadŭel aŭ Poplar[1] en la tragika domaĉaro de l' dok-kvartalo. Egale ni povus sekvi la dokiston de Bombe al lia netakseble pli malhela, tragika, nigra truo, lia "chawe"[2] en la terure malsaniga indiĝena kvartalo de Bombe, kie li loĝas kun sia familio kaj kunpremita aro da kunuloj. Tio, kion ricevas la londona dokisto kiel salajron, ebligas lin havigi al si malgajan hejmeton en Ŝadŭel. Ĉu eblas imagi, kian hejmon — minacatan de malsato kaj malsanego —, povas havi la dokisto de Bombe per sia salajro?

1 Do, iom pli ol 1 marko germ. potage.

La hejmoj de la teks-laboristoj en Bombe — de la hindaj laboristoj ĝenerale — estas nepriskribeblaj. Senfenestraj dometaĉoj kun kot-ŝmiritaj muroj kaj plankoj el tero, en kiuj estas malorda kunmiksaĵo el ĉifonoj kaj kelkaj metalaj potoj, nenia provizo da pura akvo, neniaj necesejoj nek sanigaj aranĝoj — kie viroj, virinoj kaj infanoj vere svarmas, maljunaj kaj junaj, malsanaj kaj sanaj; kuirantaj sian manĝaĵon, sin lavantaj, manĝantaj, dormantaj, naskantaj infanojn kaj mortantaj; vivetantaj per iom da rizo aŭ graso, ĉiam malsategantaj — jen ĉi-tiuj hejmoj.

Industriigo de l' Oriento

Per rigardo al la dokistoj de Bombe kompare kun tiuj de Britio, oni povas senti, kvazaŭ, la malbonsignan minacon de Hindio.

Hindio estas en stato de transformiĝo. Tio, kio okazas hodiaŭ en Hindio similas tion, kio okazis en Britio dum

1 Angle: Shadwell; Poplar: orient-londonaj dok-kvartaloj.
2 Chawe (esp.: Ĉo): unu el kabanaro.

la malhela periodo de l' Industria Revolucio. Sed en Hindio la grado de progreso estas multe pli rapida kaj la giganta homara dramo ludiĝas laŭ pli ampleksa skalo. La kapitalismo, kiu malvolviĝas tie, ne rezultas el ia procezo de interna ekonomia kreskado, sed grandparte el ekstera al-trudado. Ne temas pri la komenciĝo de kapitalismo, kun individuaj mastroj kaj malgrandaj entreprenoj, kiel en Britio antaŭ pli ol jarcento, en nuntempa Hindio, sed pri la multevoluinta kapitalismo de l' trustoj kaj kuniĝoj kaj gigantaj industriaj entreprenoj, kiu estas rapide kondukita en vastan teritorion loĝantan de milionoj da malriĉegaj kamparanoj, kiuj vivas plejgrandparte laŭ feŭdaj kondiĉoj.

La historia esploro sciigis ĝenerale pri la faktoj de l' Industria Revolucio en Anglio, kaj pri la maniero laŭ kiu grandaj nombroj da personoj, kiuj estis disigataj de l' lando, kiuj estis senteruloj kaj almozuloj, iĝis sen propraĵo, sen vivrimedoj. Por vivi, ili estis devigataj plenigi la urbojn kaj la centrojn de l' industrio kaj vendis sian laborpovon al la kapitalistaj dungantoj. Ni scias, ke tiuj, kiuj havis nur sian laborpovon kiel vivrimedon, amasiĝis ĉirkaŭ la fabrikoj, laborejoj kaj muelejoj, sin proponantaj al la mastroj kiel eble plej malkare. Ni scias, ke la Industria Revolucio estis periodo de terura mizero por la laboristoj; periodo de ega ekspluatado, de malaltaj salajroj, de industriaj inferoj kaj de kabanaĉoj kaj domaĉaroj. Ni scias, ke en tiu tempo komenciĝis la kresko de la grandaj industriaj urboj — kiel Manĉest'r, Birming'm, Glasgo kaj Ŝefild[1] kiuj ensuĉis la homaron de l' kamparo kaj ŝvelis per miloj, eĉ milionoj da mizeraj proletoj.

Simila procezo okazas hodiaŭ en Hindio.

La Hindio, kiu ne ekzistas

La ĝenerala kredo pri Hindio en Britio estas, ke ĝi estas ia speco de cirka procesio, kun juvel-kovritaj "rajah"-oj[2] rajdantaj sur elefantoj, barbhavaj lancistoj sur kapriolaj ĉevaloj, vualitaj knabinoj kaj amasoj da blankvestitaj kaj turban-ĉapelaj homoj, kun la batado al "tom-tom"-oj[3] kaj la kantado de strangaj kantoj. Tia Hindio de fi-brilaĵo apartenas la librojn pri ferakontoj. Ĝi ne ekzistas. Tio, kio ja ekzistas, estas lando, kie tri cent milionoj da personoj malsatas ĉiun tagon de sia vivo. La vasta plimulto el tiu popolo estas terkulturistoj — prilaborantoj al tero sub primitivaj kondiĉoj. Tiom primitivaj estas ĉi-tiuj kondiĉoj, tiom malfacila estas la sorto de ĉi tiuj penegantoj, tiom malplena kaj nesufiĉa estas ilia vivo, ke ili estas la plej malriĉa popolo en la mondo. Iliaj cirkonstancoj konsistigas tion, kio estas nur iomete pli bona ol sklaveco. En kelkaj lokoj, ili vere estas sklavoj. En kelkaj ŝtatoj hindaj, kie la "rajah"-oj regas kiel en antikvaj tempoj kaj daŭrigas la tradician luksan elmontron, sistemo de mezepoka aŭtokratio ekzistas. "Begar", t. e. deviga laboro, estas ofta. Kaj tio estas la sklaveco. En aliaj lokoj, kie ekzistas la sistemo "Kamia", centoj da miloj da



Hinda vilaĝanino

homoj ŝuldadas al procentuloj aŭ terposedantoj ĝis sumo da £ 3 (40 rubloj) aŭ malpli ĉiu; kaj konsekvence, ili kaj iliaj edzinoj kaj infanoj kaj la infanoj de iliaj infanoj iĝas la ligitaj servutuloj de nura procentulo aŭ terposedantoj por ĉiam. Estas terkultura Hindio, kiu liveras la nigran kaj teruran fonon (malantaŭaĵon) por la tuta bildo. La hindaj industriaj laboristoj ne estus amasiĝintaj en la centrojn de industrio, se ne rezultas ekonomia profito el tia agado.

La hindaj salajruloj hodiaŭaj estas abomene ekspluatataj — eĉ pli ol estis la salajruloj de Lankaŝ'r[1] antaŭ jarcento. Sed estas videble, ke ili ne estus sin submetintaj al la terura ekspluatado, se ilia antaŭa situacio ne estus egale aŭ pli mizera.

Komparoj

Traktante ĉiun industrion laŭvice, oni konstatas, ke la britaj laboristoj ricevas de kvar- ĝis dekduoble pli altan salajron ol laboristoj en similaj okupoj en Hindio. En la teks-fabrikoj, en la fer- kaj ŝtal-laborejoj, en la karb-minoj, en la maŝin-laborejoj, ĉe la fervojo, ĉe la te-kulturejoj kaj en la urb-servoj, la salajra nivelo estas tiom fantazie malalta, ke vivo per ĝi estus neebla en Britio. Tamen la hindoj estas tre inteligentaj. Ili rapide spertiĝas. La mirindaĵoj de hinda manlaboro estas konataj dum jarcentoj. Ili kapablas labori, post la industria instruo, tiel kontentige kiel eŭropanoj. Se oni donus al ili nur iomete pli da nutraĵo, kelkajn pliajn monerojn por aĉeti kromon da rizo, ilia daŭrforto ĉe laboro egalus tiun de la blankhaŭtuloj.

Oni devas konstati, kiel mi jam diris, ke estas la grandskala moderna kapitalismo, kiu ekprenis Hindion per siaj ungegoj. Estas la Kapitalist-Imperialismo, kun siaj larĝe disvastigitaj fabrikoj kaj maŝinaroj, siaj simpligitaj labor-metodoj, siaj plej lastaj elpensoj kaj aranĝoj; kaj la alĝustigo de la korpaj kaj cerbaj kapabloj de l' hinda laboristaro al ĉi tiu moderna kapitalismo estos multe pli facila ol estis tiu de la britaj laboristoj al la frua maŝina produktado de la Industria Revolucio.

La Estonto

Mi skribas pri la malbonsigna minaco de Hindio. Ĉu ĝi ja ne estas konstatebla? Ekzistas, eĉ nun, signifa alilokiĝo de l' industrio el la okcidenta mondo al la orienta. Nur imagu Hindion, kun ĝiaj gigantaj riveroj, ĝiaj grandegaj naturaj rimedoj, ĝia ligno, ĝiaj karbo kaj fero, ĝiaj kotono kaj juto, ĝiaj agrikulturaj ebloj, kiam la nunaj primitivaj metodoj ŝanĝiĝos en modernajn. Nur imagu tiun Hindion plene industriigita, kiel estas neevitebla, kun la laboristoj pligrandigantaj la urbojn de Bombe, Kalkutta, Madras kaj aliajn urbojn kaj starigantaj hindajn Londonojn, Birming'm-ojn kaj Manĉest'r-ojn — malbelaĉajn hindajn metropolojn kun miriadoj da salajrsklavoj loĝantaj en mizeraj domaroj.

Ĉi tio estas realiĝanta

Tiuj doklaboristoj de Bombe, laboregantaj apud la Hinda Maro, antaŭsignas ĝian alvenon. La industrio de Britio devas velki kontraŭata de tiu hinda konkurado. Kiel ĝi povos postvivi la tempon, kiam komercaĵoj produktitaj per tiu malkara laboro superŝutos la mondon?

Se ne...

Se ne la hindaj laboristoj sin organizos kaj tiel povos starigi grandan bataleman Sindikatan kaj Politikan laboristan movadon, kaj per tiuj rimedoj estos povaj trabati sian vojon tra la kapitalismo kaj starigi Socialismon en la tuta potencega hinda duoninsulo.

A. A. Purcell (parl. deputito),
en gazeto La Plebo ("The Plebs").
Trad. E. K. L.

---

[1] Angle: Manchester, Birmingham, Glasgow, Sheffield.
[2] Rajah (esp.: Raĝa): hinda aristokrato.
[3] Tom-tom: Muzikilo, ĉefe por ritmo.

[1] Angle: Lancashire: unu el la "shire"-oj, t. e. provincoj de Anglio.

PER KOOPERADO AL SOCIALISMO

La kooperativa movado en Ivanovo-Voznesensk ekzistas jam pli ol dudek jarojn. En 1907 aperis malgranda butiko, reorganizita de kooperativa societo je nomo “Ĵedinenije Sila“ (esperante: Unueco estas forto). Tiu societo transformis la disfalintan kooperativon de urboficistoj. Ĝi starigis al si kiel celon plibonigi la vivkondiĉojn de l' laboristaro kaj subteni laboristojn dum strikoj; ĉar dum la striko en jaro 1905 la butikistoj tute ne vendis varojn al laboristoj.

Komence de sia agado la kooperativo tute ne havis oficistojn, sed la kooperativanoj mem plenumis la laboron. Dum la unuaj tagoj oni vendis varojn ĉiutage por la proksimuma sumo de 10 rubloj, kaj nur poste, kiam aperis ĉe la laboristoj simpatio por sia ido, la disvendo fariĝis pli bona. La tiam ekzistantaj profesiaj unuiĝoj helpis al la kooperativo per mono kaj transdonis siajn funkciulojn, ĉar oni vidis, ke per la kooperativo la kultura nivelo de l' laboristoj plialtiĝos.

Dum la unuaj jaroj la kooperativo unuigis malmulte da anoj. Por interesi la laboristojn, ĝi aprobis premion da 1½% por ĉiu rublo alportita en la kason. La unuaj oficistoj en la butikmagazeno de la societo estis aktivaj gvidantoj de l' sindikata movado, kaj tial ili krom sia ordinara laboro plenumis ankoraŭ taskojn de l' kooperativa movado kaj varbis novajn membrojn. Ĉar ili havis respondecan senton, ŝtelistoj ne troviĝis inter ili.

La situacio de l' kooperativaj oficistoj estis pli bona ol tiu ĉe privatkomercistoj. Ili laboris 9 horojn potage kun tagmeza interrompo de du horoj. Ili havis ĉiusemajnan ripoztagon kaj jare dusemajnan libertempon, kio ne okazis ĉe privatkomercistoj.

Politik-eduka agado

Certe la kooperativo tute ne povis influi je la prezoj de l' merkato, ĉar antaŭ la Revolucio ekzistis potencaj privatkonkurantoj. Sed la taskoj de la societo estis tute malsamaj. Krom vendo de varoj oni plenumis kulturlaboron inter laboristoj. Kiam regis caro kaj kapitalistoj, tia agado estis ekstreme grava. Dum tiu tempo ĝeneralaj kunvenoj de la kooperativanoj havis edukadan signifon. Sub kaŝa formo oni disvastigis la ideojn de socialismo per la kooperativo. Ankaŭ oni aranĝis lekciojn pri kooperado, kiujn tamen ofte malpermesis la policestraro. La kooperativo disdonis multe da literaturo al siaj aĉetantoj. Ĝi estis disdonata en magazeno kaj fabrikoj kaj enmetata en aĉetaĵoj.

Ankaŭ la kooperativo estis konspirejo por partianoj, kaj pro tio la polico persekutis la kooperativan gvidantaron. Batalante per ĉiaj rimedoj kontraŭ la kooperativo, la policestraro postulis, ke la societo eksiĝu el la samspeca loka korporacio kaj ankaŭ el la Kooperativa Internacio. La kooperativo timante pro sia sorto obeis. La kooperativa Internacio protestis per la angla registaro kontraŭ la agado de l' rusa ŝtato. Sed tio havis malan rezulton kaj plifortigis nur la persekutojn.

Pozitivaj rezultoj

La komercafero iom post iom pliboniĝis. La ĉefa revo de l' kooperativanoj estis havi propran domon. Tiu revo efektiviĝis en 1915, kiam oni konstruis duetaĝan brikan domon. Dum malsato kaj civilmilito, komencante de Oktobra Revolucio en 1917, la kooperativo batalis kontraŭ siaj konkurantoj, malgrandaj stratkooperativoj, kiuj aperis helpe de fabrikposedantoj kaj oficistoj.

La gvidantoj de “Ĵedinenije Sila“ starigis en 1918 da demandon unuigi ĉiujn kooperativojn en la urbo. Tiu tasko efektiviĝos fine. En 1919, dum malsato, la Urba Nutrokomitato (Gorprodkom) proponis al la kooperativo akcepti ĉiujn ties magazenojn kaj kune disdoni nutraĵojn al la loĝantoj. Poste Gorprodkom transdonis ĉiujn funkciojn. Restis al ĝi nur la kontrolo. Tiun laboron la kooperativo plenumis ĝis Nova Ekonomia Politiko (NEP).

Nova Ekonomia Politiko kaj nuna evoluo

Tiu periodo estis tre malfacila por la organizantoj, ĉar la ekonomia malforto de la laboristoj malhelpis al la kooperativo kolekti monon. Krome la malaltiĝanta valuto malutile influis ĉiujn mastrumaferojn. Dank' al tio la privatkomerco kreskis pli rapide ol la kooperativa movado. Tiam la societo starigis al la sindikataj kaj parti-organizoj la demandon pri redono havon kaj varojn de ŝtata nutrokomitato. Post tio la aferoj pliboniĝis, kaj la kooperativo ĉiutempe evoluis antaŭen, superante la privatkomercon.

Se komence NEP-gvidantoj de la societo revis pri ĉiujara spezo de 3 milionoj da rubloj, nun oni vendas varojn por 20 milionoj. Se antaŭe la rolo de l' privatulo estis grandega en la merkato, male nun ĝi estas tre malgrandigita. Se la kooperativo dum la unua jaro havis 1 magazenon kun 2 oficistoj kaj vendis varojn je la sumo de 18 mil rubloj ĉiujare, nun ekzistas 75 diversaj magazenoj kun 600 oficistoj, 1 panfabriko por preparo de 32 000 kilogramoj da pano ĉiutage, 1 kolbasfabriko preparanta 3650 kilogramojn da kolbaso ĉiutage, 1 sukeraĵmetiejo preparanta diversajn sukeraĵojn en sumo de 48 mil rubloj ĉiujare, 1 bakejo farante ĉiutage 13 mil bulkojn. Anstataŭ 1 propra domo nun ekzistas 6 kaj deponejo ampleksanta 150 vagonojn da varoj. Nun la kooperativo havas sian propran kapitalon de 1371 mil rubloj, krom tio 2061 mil rublojn da fremda mono. Kooperativanoj estis 143 kaj estas nun 40 000 kun kapitalo de 600 mil rubloj.

Nedubeble la privatulo fine mortos kaj la tuta vendado estos en manoj de l' kooperativaro, kiu estos unu entrepreno por ĉiu urbo. Ĝi kontentigos ĉiujn mastrumajn bezonojn de l' laboristaro. Tiel batalante, ni per kooperativa movado iras antaŭen al socialismo.

V. Makarin (11 220).



LUDOVIKINO MIŜEL[1]

La granda ribelulino

Ludovikino Miŝel', la granda amikino de l' malriĉuloj, kiu partoprenis ilian vivon de mizeroj kaj bataloj, la virino kun koro pura, brulanta per la flamo de sankta ribelo, la arda Komunanino en 1871, restas viva en la koroj de l' pariza proletaro, kiu memorsolenas en ĉi tiuj januaraj tagoj la datrevenon de ŝia morto (1905). Ekster Francio oni scias malmulte pri ŝia vivo kaj agado. Oni scias preskaŭ nur la nudan fakton, ke ŝi partoprenis aktive en la Pariza Komuno. Vere meritas tiu nobla virina figuro, ke la SAT-anoj pli intime konatiĝu kun ŝi.

Estis vizaĝo kun viraj trajtoj, malbela, sed lumigata per la plej belaj okuloj el la mondo, okuloj delikataj kaj klaregaj; ovala frunto de poeto aŭ profeto kaj, krude plantita super la viraj tempioj, multpeza vindaĵo el grizaj haroj; energia kapo, la palpebraj sulkoj interplektitaj kun la tempia sulketaro, kiun gravuris la tempo — tia aspektis, ĉe kadukiĝa aĝo, tiu, kiun la kapitalistaj gazetoj nomis la “ruĝa virgino“, ŝiaj amikoj la “bona Ludovikino“ (france: bon “Luiz“), glora bastardino de senfama kampnobeleto, markizo de Vronkur' (france: Vroncourt).


Sed male, la manko de juno kaj belo ne malaltigis la stilon de ĉi tiu nobla vizaĝo: ĝi forte elstarigis la distingan karakteron, la imponan kaj dolor-

[1] France: Louise Michel (1833—1905).

N. LENIN:
Ŝtato kaj Revolucio
150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g.
Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT
R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27

impresan personecon. Ŝiaj esencaj trajtoj estis nevariaj dum tuta sia vivo. Apenaŭ diferencas portretoj de 1850, 1871 kaj 1901, kvankam pasis tridekkvindek jaroj. En ĉiu portreto oni retrovas la samajn liniojn, la vibreman, larĝan nazon, kiu rondiĝas ĉe l' pinto — signo de bonanimeco; la malsupran lipon iom antaŭŝovitan. La tuta karaktero de l' granda buŝo rimarkigas unikan miksiĝon de mildo kaj malestimo. La ostaro aperas peza kiel ĉe estaĵo kapabla preni sur sin la plej malmolajn ŝarĝojn. Instruita gesto, surstampo de l' pedagogio (ŝi ja estis instruistino), parolo alterne sarkasmo kaj flameca, poste, senstreĉa, infanrido, tio kompletigas la fizikan aperon de l' granda ribelulino, en kiu sesdek jaroj da apostoleco kaj mizero ne povis malfortigi la intelekton nek malgrandigi la koron.

Kaj la ĉiama kostumo akordiĝas kun tiu fizionomio: "Savarmea" ĉapelo, nigra jupo kvazaŭ en eterna funebro, pelta kloŝo.



Militantino en la tagoj de batalo, ŝi oferis noblanime sian vivon ĉiufoje, kiam tia ofero aperis necesa al ŝi por la triumfo de l' ideo. En Versaj' (fr.: Versailles), en la sangaj tagoj, kiuj sekvis la Komunon, kiam oni ekzekutis Fere (fr.: Ferré), unu el la eminentaj komunanoj, la membroj de l' sesa milittribunalo, kiuj konis ŝian amon al li, devigis ŝin ĉeesti lian ekzekuton. Alia virino estus venkita. Sed la fratino de l' Komunano, kiel Ludovikino, kondamnita je deportado kaj mortanta pro tuberkulozo, ne havis alian amikinon. Kaj Ludovikino transvivis por mildigi la teruran agonion de l' malfeliĉulino, doni al ŝi en ekzilejo iom da komfortsento. Forportite al Kaledonio, ŝi en momento, kiam oni volis disigi ŝin de ŝiaj Gekamaradoj, por konduki en malpli rigoran malliberejon, igis sian gardiston kontraŭagi la ricevitajn ordonojn. Ŝi estis preta ĵeti sin en la maron, se oni ne redonus ŝin tuj al la punlaboruloj de l' Komuno, ŝiaj amikoj.

Ŝiaj noblegaj respondoj antaŭ la militjuĝistaro eldevigis admiron ĉe la malplej senpartiaj kontraŭuloj. Volenevole tio pensigas pri la Virgino de Domremi (Johanino d'Ark) konfuzanta siajn akuzantojn. Sed tiu lasta bazis sian kuraĝon sur absurda mistika kredo, dum Ludovikino havis neniun alian apogon ol la racion, la juston, la veramon.

Multaj Komunanoj jam estis ekzekutitaj de la blankuloj. Kiam la vico venis por Ludovikino, ŝi demandite uzi siajn defendrimedojn respondis: "Mi postulas de vi la "foston de Satori"[1], kie jam falis niaj fratoj: oni devas fortranĉi min de la socio. Oni ordonis al vi ĝin plenumi. Nu bone, oni pravas. Ĉar ŝajnas, ke ĉiu koro, kiu batas pro la libero, hodiaŭ rajtas nur ricevi kelkajn kuglojn, mi postulas mian parton da ili!"

Ĉu la heroinoj de l' klasika antikva tempo iam faris pli firmajn parolojn? Sed por batalanta kamaradno la epopeaj horoj ne sonas ĉiujn tagojn. Ludovikino Miŝel konis ankaŭ la epokojn interpacajn, malgraŭ sia koro de apostolo kaj soldato. Dum tiuj ĉi necertaj ekhaltoj renaskiĝis ŝia profesia inklino kaj ĝi manifestiĝis ordoneme. Post la batalo — la propagando, kaj la instruistino post la militantino. Ŝi memoris siajn atestojn pri kapablo kaj sentis la profundan bezonon disvastigi la lumon, kiel ŝi faris antaŭe en Vronkur, lando de sia infaneco, en edukejo de Batinjol (fr.: Batignollès), kie ŝi faris siajn unuajn infan-edukajn paŝojn, kaj en la perdita insulo, kie ŝi fervore edukadis la kanakajn indiĝenajn) bubojn.

Tiom da virtoj kaj noblega grandanimeco havis nenion pedantan aŭ malvolonteman en si. Ŝi havis la "manion de Boneco", kiel la mistikuloj de l' mezepoko tiun de l' Kruco. Ŝi amis, senhavigis sin por ĉiuj, donis dum plena vintro siajn vestojn al malriĉaj, nenion konservis por si, nenion havante krom la almozoj, kiujn ŝi disdonis kun la plej fiera modesto.

Ŝi ne estis feministino. Ŝi mem mokis kun akra ironio pri la "oratorinoj", kiuj postulis politikajn rajtojn en la nomo de l' "malforta sekso". Ne volante "krei doloron", ŝi restis virga, opiniante, ke tio estas la sola konvena rimedo por ne havi infanojn.

Ŝi faris versojn de granda vervo, torentajn kaj romantikajn. Ŝi ne atentis lingvaĵon kaj metrikon en ili. Sed la libera kredo, la nobla ribelemo brilis en ŝiaj poemoj kiel en ĉiu el ŝiaj paroladoj[1]. Ŝi vivis pure kaj noble, kiel ŝi pensis kaj amis neniam alion ol la veron, la bonon. Kaj eĉ en malfeliĉaj, malprosperaj tempoj ŝi neniam malesperis pri l' idealo.

[1] France: Satory; fortifikaĵa plato proksime de Versaj', kie la kondamnitoj estis ligataj al fostoj k mortpafataj.

[1] Ĉi, sube ni aperigas unu poemon verkitan en la Antaŭkomuna periodo. Ĝi aperis en unua volumo de Postmortaj Verkoj, eldonitaj tuj post ŝia morto (1905) de siaj amikoj.



PARIZO

Ombraro verŝis siajn urnojn densmallumajn;
La tuta nokt' sen hel' — fantomojn silentumajn;
Inside dormas kaj verde en lit' profunda l' ond',
Faŭko ĉiam malferma, en silento terura,
Oni aŭdas subite al la mister' senmezura
Iun objekton fali de pont'.

Kvazaŭ irus kune la stratlanternoj palaj,
Ĉiuj blovoj glaciaj pro l' mizeroj fatalaj,
La fantomoj vivantaj kaj la frostmortintoj,
La banditoj embuske sub la pordoj en ombro —
Al sama lok', mortulej', enirante kie sen nombro
Ili estas estingiĝintaj.

Procesio naŭzega! kie la viroj, virinoj,
La infanoj terurigitaj, unuj, korpoj, aliaj, animoj,
Rifuzas vane, foriras, iras, senfina ĉen'!
Ĉiuj jen! inter fantomoj aŭ, diru mi, penso,
Jes, ĉiuj estas ĉe sia lok' laŭ de l' voj' intenco
Vasta kaj funebra maten'.

Parizo, 1861. Ludovikino Miŝel.

Trad. N. B.

Kio estas

DIABLIDOJ?

Rakonto pri knaboj, kiuj spite malbonŝanco kaj malagrablaj spertoj restas estroj de la situacio. La malgrandaj herooj trovos admiron kaj simpation ĉe la leganto.

48 paĝoj. Kun tutpaĝa titolbildo.

Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

SENNACIULA SPORTA PAĜO

Kompilanto: Ad. Wendt, Leipzig O 27, Lange Reihe 11-a (Germ.)

LA BLANKA SPORTO

2. Asocia Vintro-Sportfesto de Laborista Gimnast- kaj Sportasocio de Germanio en Johanngeorgenstadt (Ercmontaro), 30. decembro 1928 ĝis 1. januaro 1929

Laboristsporto estas amas-sporto. Veki la laborulojn, logi ilin for el inter la ŝtonaj muroj de la urboj, el inter mucidaj ĉambroj de la kamparaj loĝejoj, kaj konduki ilin al edifa beleco de naturo — jen ĝia plej alta celo. Kaj kie la aero estus pli pura, kie la pulmoj povus spiri pli libere, ol tie inter la pintoj de la arbarkovritaj montoj? Tial ni almilitis la blankan sporton, kaj post multaj penoj ni venkis kaj festis la triumfon: malnovon ni estingas, la novo nia cel', standardon ruĝan svingas ni de l'batal' ribel'!

Antaŭa stato: La temperaturoj falas, la fido de la festa gvidantaro persistas kaj la esperoj de la interesitoj por la festo kreskas. Du tagojn antaŭ la festo novneĝo kaj jam 500 partoprenantoj sur la loko. Morgaŭan tagon denove degela vetero kaj ĉiam novaj aroj da alvenantoj. La vespera vagonaro alportis sabaton centojn da ski-ekipitoj, kiuj kun muziko kaj torĉa akompano marŝis en la urbeton. Johanngeorgenstadt staris plene sub la signo de la laboristsporto. La loĝeja demando estis brile solvata. 500 privataj loĝejoj, 400 komunaj loĝejoj kaj 400 amasloĝejoj estis disponeblaj. Tio estis la merito de l' sinoferema varblaboro fare de la regalantaj K-doj kaj la merito de dankinda gastemo ĉe la loĝantaro.

Je la 30. decembro, la 1. festtago, estis iomete glaciiĝinta neĝo. Kun "Frei-Heil"[1]-vokoj forlasis je la 8.39 h. la unua el 160 kuruloj de la 12 km-kuro la starton. Per tio la oficiala programo estis malfermita. La konkurantoj montris sin ĝenerale kiel bonaj regantoj de siaj skioj. Grandajn kapablojn postulis la lastaj 500 metroj antaŭ la celo, kiuj pro tre kruta deklivo kaj onda tereno kaŭzis furiozan finveturon al la foirejo de la urbo. Atentindan avantaĝon certigis al si Wagner el Ŝrajberhaŭ (Schreiberhau), kiu ekveturis kiel 70-a, kaj alvenis kiel 13-a. Li venkis en 53 min. 14 sek. Dua fariĝis Weichert-Gornsdorf en 56 min. 09 sek. Tria Dressler-Marienberg (Ĉeĥoslovakio) 58 min. 45 sek.

La 8 km-distancon por junuloj 16—18 jaraj kuris brile Kupfer-Stützerbach (Tur.) kaj venkis en 42 min. 05 sek. — La 5 km-distanco por 14—16 jaruloj estis afero de la Johanngeorgenstadtanoj. Venkinto: Kraus en 24 min. 23 sek. La sportinoj en la 4 km-kuro estis multnombre reprezentataj. La kuron venkis K-dino Wittmar-Chemnitza Naĝunuiĝo 22 min.

[1] Saluto de l' germanlingvaj lab. sportuloj.



Ĉirkaŭ 4000 rigardantoj ĉe la granda saltreduto apud Johanngeorgenstadt.

Posttagmeze amas-manifestacio movis sin al la glacikurejo sur ĉeĥoslovaka tereno. La glaci-artkuraj konkursoj vidigis bonegan povon. Plej bonan rezulton atingis Kreuzberg-Leipzig per 30½ poentoj. Virinoj: Gehrmann-Leipzig 28½ poentoj. En la 500 m glaci-rapidkurado venkis senpene Schulze-Siegmar en 1 min. 21,2 sek. Schulze estas bonega kurulo.

Post tio aro da pli ol 4000 personoj marŝis al la saltreduto por vidi la montran saltadon. Kio tie estis vidata, estis unuaklasa kaj devigis al plej alta rekono pri la kuraĝo de la saltantoj. Oni vidis saltojn je pli ol 35 metroj. Vespere okazis salutparoloj de l' urbestro kaj de reprezentantoj de l' frat-organizoj, al kiuj respondis la asocia prezidanto K-do Gellert.

Venontan tagon foriris kiel unuaj la 20 km-kuruloj. Novneĝo kondiĉis grandan fortostreĉon, sed ili ĝenerale estis majstroj de sia fako. En furioza finveturo alvenis unu post la alia la unuaj kvar tra la loko. Venkinto: K-do Sander el Ŝrajberhaŭ 1 horo 39 min. 48 sek. — En la 5 km-trupa kuro por junuloj venkis Breitenbrunn, tempo 25 min. 50 sek. Ankaŭ la sportuloj pli aĝaj ol 35 jaroj estis multnombre reprezentataj kaj montris sian veturlerton ĉe la 5 km-kuro. Venkis Friedrich-Johanngeorgenstadt 25 min. 38 sek. La amasa gimnastikado sur skioj kaj la konkur-rodlado (glitveturado) dum la posttagmezo havis multnombran publikon. Ambaŭ prezentoj pasis laŭprograme. Forta aplaŭdo estis la danko por la kvalito de l' atingoj. Venkintoj: sportuloj (du-ula glitilo) Tautz-Ŝrajberhaŭ; sportuloj (unu-ula glitilo) Wagner-Ŝrajberhaŭ. Virinoj (unu-ula glitilo) Hauser-Johanngeorgenstadt. Virinoj (du-ula glitilo) Kunzmann-Johanngeorgenstadt.

Poste la amasoj de l' rigardantoj turnis sian atenton al la saltkonkursoj de kombinita kuro (8 km kaj 1 salto). Bonegaj saltoj estis montrataj. La kombinitan kuron gajnis Schroll-Bischofshofen (Stirio).

La plej grandan impreson faris torĉa manifestacio, plenumita dum jarfina nokto. Johanngeorgenstadt estis maro da flamoj. Ĉe la foirejo salutis K-doj Gellert kaj Koppisch la novan jaron, kiel jaron de batalo, ago kaj laboro. La novjara tago vidis la 8 km-trupkonkuron kaj la 1500 m-malhelpaĵkuron kaj kiel finon la taksitan saltadon. Inter la 33 trupoj de la trupkonkuro estiĝis interesaj luktoj. Pulvora neĝo permesis pli grandan rapidecon. Marienberg (Ĉeĥoslovakio) pruvis sin kiel plej bona trupo en 41 min. 12 sek. La plej altajn postulojn je la kapableco en skiado metis la 1500 m-malhelpaĵkuro. Kun admirinda kuraĝo veturegis la skiantoj malsupren de sur la krutaj deklivoj kaj transsaltis en furioza veturo arbetaĵojn kaj riveretojn. Unua fariĝis Wagner-Ŝrajberhaŭ en 5 min. 29 sek., 2. Schroll-Bischofshofen (Stirio) 5 min. 49 sek.

La taksita saltado dum posttagmezo allogis malgraŭ severa malvarmo grandajn arojn da rigardantoj. Longaj, belformaj saltoj estis vidataj. La plej bonan poentnombron atingis Wagner-Ŝrajberhaŭ 17,416 per salto de 29 m. Schroll-Bischofshofen cetere saltis 30,50 m, sed li malprofitis pro malpli bona sinteno kaj fariĝis dua kun 17,374 poentoj. Sassa-Maxdorf (Ĉeĥoslovakio) saltis 29 m en plej bona sinteno kaj fariĝis tria kun 17,217 poentoj.

Plenaj de neforgeseblaj impresoj kaj kun ĝoje brilantaj mienoj rapidis vespere la partoprenantoj al la vagonaroj. Ĝis revido en Nürnberg, dum la 2. Asocia Festo 18. ĝis 21. julio. Finiĝis la festo. Ĝi estis sukceso, kiu superis ĉiujn esperojn — ĝi estis la triumfo de celkonscia laboro. Vivu la laborista sporto!

SPORTA FAKKUNSIDO
dum la 9. kongreso de SAT en Leipzig

Sporta Komitato de SAT alvokas ĉiujn anojn de SAT, kiuj samtempe estas membroj de korpokulturaj rondoj, al kunsido de la Sporta Sekcio de SAT, okazonta je la 6. aŭg. 1929 en la Lab. Gimnast- kaj Sportlernejo en Leipzig, Fichtestr. 36.

Celo de l' kunsido estas: 1. diskuti la agadon de l'sporta komitato, 2. solvi organizajn demandojn de l' sporta sekcio de SAT.

Por sufiĉe frue komenci la preparajn laborojn, ni jam nun petas ĉiujn Gek-dojn, informi nin pri la eventuala partopreno kaj fari proponojn por la tagordo.

Sporta Sekcio de SAT, kom.: Ad. Wendt.

TRA ESPERANTIO

Aktuala Problemo

Estas nedisputebla fakto, ke la bazo de SAT-laboro, ĝia fundamenta celo, estas interligo de tutmondaj proletoj, disvolvo kaj fortigo de ilia klasa solidareco kaj fratiĝo pere de esperanto. En nunaj politikaj cirkonstancoj, kiam tutmonda burĝaro denove fortigas sian atakon kontraŭ la Laboristaro, kiam ĉiuj metodoj estas provataj por disigi la Proletaron, instigi proletojn de unu nacio kontraŭ proletoj de aliaj, — tiu problemo de interligo akiras karakteron de akra neceso. La SAT-aparato kaj "S-ulo" estas perfektaj iloj ebligantaj tiun interligon en plej larĝa skalo. Sed ni devas konfesi, ke ĝis nun ni tro malmulte da atento dediĉis al tiu problemo.

Ni prenu la internacian korespondadon, kiu sendube estas la animo kaj la plej efika instrumento por tiu interligo. Ĉu ofte ni renkontas sur paĝoj de "S-ulo" debatojn pri tiu problemo? Ĉu diverslandaj Labeskoj[1] interŝanĝas sian sperton pri tiu laboro, skribas pri siaj malfaciloj aŭ atingoj? Analizante la ĝis nun ekzistantan korespondadon, oni devas veni al konkludo, ke plejparte ĝi estas individua korespondado kaj tial ĝia socia signifo estas tre limigita. Kaj nevole venas en kapon la demando: Ĉu ni SAT-anoj, esperantistoj, la iniciatantoj kaj efektivigantoj de tiu interligo, preskaŭ ĝiaj monopolistoj, devas kaj rajtas limigi nin mem per tiu interligo?

Konsiderante la celon, kiu staras antaŭ ni kaj devas bazi sur amasa laboro, kaj ankaŭ la praktikon, kiu montras, ke interligo de neesperantistoj por korespondado estas la plej efika propagando kaj instigo por lerni esperanton, la plej bona propagando por SAT, "S-ulo" kaj sennaciismo, ni nepre devas ŝanĝi niajn labormetodojn. Ĉiu SAT-ano, ĉiu Labesko devas fari ĉion eblan por interligi sian oficejon, kunlaborantojn, labkorojn, junulojn kun samprofesiuloj el aliaj landoj. Tio sendube estas pli facile efektivigebla ol lernigi esperanton antaŭe. Sukcesa korespondado multoble pli rapide kreskigas nian movadon, aŭtoritatigas ĝin, montras ĝian praktikan signifon ol nuda kaj abstrakta propagando. Se mi ne eraras, tia metodo estas larĝe praktikata nur en Sovetio (kaj i. a. nur al ĝi ni ŝuldas la progreson de esperanto en Sovetio). Pro tio ke en aliaj landoj la samaj metodoj ne estas praktikataj, ni renkontas multe da malfaciloj: Ekz. en Sebastopolo preskaŭ ĉiuj ĉeloj de junkomunistoj kaj ĝenerale laborista junularo deziregas korespondi kun junularo el aliaj landoj. Ili eĉ estas pretaj por tio ellerni esperanton. Sed kie preni por ili tiom da adresoj? Se en "S-ulo" iafoje aperas adreso de junulo, oni ne scias, al kiu ĝin doni unue, kaj verŝajne la malfeliĉa adresato estas atakata de ĉiuj urboj. Kaj ĉu ne ekzistas centoj da junkomunistoj aŭ senpartiaj junuloj, kiuj plezure akceptus la korespondadon, se iu perus tiun interligon? Samon oni povas diri pri multaj plenaĝaj laboristoj, kiuj emus interligiĝi kun siaj samprofesiuloj.

Do konkrete: Labeskoj kaj apartaj SAT-anoj devas anstataŭ nuda propagando de esperanto, kiu estas plej ofte senfrukta, interligi siajn kunlaborantojn, ĉelojn, ĵurnalojn, labkorojn kun samspecaj institucioj, prenante sur sin provizore la tradukon de leteroj.

2. En "S-ulo" sekve devas aperi ne nur anoncoj de esperantistoj, sed ankaŭ de korespond-dezirantoj neesperantistaj.

3. La anoncpetantoj devas noti sian aĝon, profesion, se eble, partiecon, por ke oni povu elekti konforman korespondanton.

4. Konsiderante la signifon de junularinterligo, la estro de junularfako devas trovi metodojn por instigi la korespondadon inter junularo kaj esti efektiva peranto por tiu afero.

Per tiaspeca laboro ni tre rapide povas multobligi la membrojn de SAT kaj efektive fari esperanton la lingvo de tutmonda Proletaro.

Ida Lisiĉnik (3632).

[1] Lab. esp. Korespondantoj.

Pri metalista sekcio de SAT

Dum la SAT-kongreso en Göteborg okazis ankaŭ fakkunsido de metalistoj, kiun ĉeestis ĉ. 40 gemetalistoj el 8 landoj. I. a. la kunsido unuanime aprobis fondi SAT-sekcion, sed por ke la decido ne restu nur surpapera, estis elektata komitato el 3 K-doj, kiu ĝis la venonta kongreso en Leipzig ellaboros planon. La komitato tial deziras interrilatojn k proponojn de metalistoj el ĉiuj landoj, pri labortaskoj de l' Sekcio. Ĉu vi konsentas specialan faklaboron k kiel ni organizu tiun laboron? Ĉion adresu al: Esp. met. komitato, Anton Norling, Omberg 2, Göteborg, Svedio.

El la Redaktejo


Kiel vi legis en la unua paĝo de l' lasta n-ro, ne nur temas pliampleksigi kaj per bildoj plibeligi nian gazeton, sed ni volas fari ĝin unuakvalita laŭ enhavo kaj ne komparebla kun iuj nacilingvaj ĵurnaloj, transprenante per simplaj tradukoj ties artikolojn. Nia organo devas speguli la originalecon kaj proprecon de nia kulturmovado. Tial niaj kunlaborantoj memoru, ke ni preferas originalajn artikolojn. Ni ja konscias kaj spertis, ke originale verkante niaj K-doj kapablas krei novajn spiritajn valorojn, aldoni iun pluson al la ĝisnuna spirita produktado en proletaj rondoj. Niaj K-doj, ellerninte esperanton, alproprigis al si ja specialan kvaliton, kiu mankas ĉe neesperantistoj. Ili akiras la kapablon pritrakti kaj priskribi iun temon pri laborista vivo kaj agado sub aparta lumo, sur spirita nivelo, kies bazo estas dislarĝigita.

La praktiko montris jam kelkajn rezultojn tiurilate. SAT-anoj, kiuj havas, dank' al sia organizo, kontakton kaj pensinterŝanĝon kun K-doj, labor-kolegoj en ĉiuj partoj de la terglobo, verkas siajn artikolojn en sennacieca spirito. Estas komencoj, sed ili promesas multon. Tiel "S-ulo" estas en pozicio, kiu permesas al ĝi eviti imitadon de iuj nacilingvaj proletaj gazetoj: ĝi ne limiĝas peri al la legantoj per tradukado el aliaj fontoj ĉerpitan materialon — kvankam ankaŭ tio jam estas plenuminda tasko por tutmonda gazeto, se la elekto de l' tradukantoj estas trafa — sed vere, ĝi fariĝas mem fonto de produktado . . . je la servo kaj por utilo al la tutmonda Proletaro.

Kunlaboru, K-doj! Ne subtaksu vian verkokapablon, observu vian medion, vian agadsferon kaj priskribu tion, kio ŝajnas al vi koninda kaj interesa por tutmonda Legantaro! Se vi povas aldoni taŭgan bildon al via priskribo, ni despli multe ĝojos, ĉar bildoj fidele atestas pri faktoj.

N. B.

Nur tiam vi rajtas paroli pri sukceso, kiam el via kurso rezultas aliĝoj por SAT kaj abonoj por "S-ulo".



Pagante la tre ege malaltan abonmonon por la nuntempe sola esperantista mondrevuo **literatura, scienc-teknika, eduka**

LA NOVA EPOKO

vi certigas al vi ĉiumonate 32-paĝan kajeron kun valora, interesa legaĵo, kiu kontentigos vin. La jan. n-o ĵus aperis!

Unuopa kajero estas havebla kontraŭ pago de 0,35 mk. g. ĉe

Administrejo de SAT, Leipzig O 27 (Germanio)

Petu katalogon!

Ankoraŭ pri pagiloj por SAT-anoj

Kun intereso mi legis la antaŭajn artikoletojn pri tiu temo. Necesas trovi iun solvon. Certe ĉiu jam pro io klopodigis alilandulon kaj ne povis kompensi pro manko de kompensilo. Sed kial krei novan monon aŭ alispecan pagilon? Ĉu ne estas superflua elspezo flanke de nia Asocio? Ĉu ne estus troa multobligo de la laboro por perantoj kaj administranto? Mi pensas solvi la problemon tiel, ke la paganta K-do sendu sian sumon al la Administrejo. Tio havas duoblan avantaĝon: la administranto ricevas multan monon kaj la K-do, kiu estas celita per la pago, povas uzi ĝin por kotizo, aĉeto de libroj, abonmono ktp. Ankaŭ la administranto ne havas la laboron eldoni novan pagilon kaj noti pri ĝi[1]. Certe multe helpas al K-dino X., se ŝi bezonas pagi nur la duonon de l' abonmono por "S-ulo", ĉar la alia parto jam estas pagita (pro kompenso de alia ŝuldo) de K-do Y. Tiel laŭ mia opinio oni povus kompensi elspezojn privatajn de alilandaj korespondantoj.

K. Grohmann (1741).

[1] La laboro eldoni pagilon estas unufoja, dum la registrado de l' transpagoj de konto al konto estas konstanta kaj tre peniga. Ĉar la nova pagilo ne bezonas esti registrata je persona konto de l' K-doj, tiu procedo do estas, male je la opinio de K-do 1741, pli simpliga por la administranto. — Red.

Por la 9-a SAT-Kongreso

Sigelmarkoj: 60 ekz. (1 folio) 0.50 mk. g.
Leterfolioj kun kovertoj: 15 ekz. 0.50 mk. g.
Tuj mendu ĉe: W. Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24 aŭ ĉe Adm. de SAT.

For la neŭtralismon

Finfine "Monde", la semajna gazeto, kiun direktas H. Barbüs, enmetas pri-esperantan materialon. La multaj leteroj, kiujn sendis al la Redakcio SAT-anoj, instigite de niaj rimarkoj, boninfluis tiurilate. Ĉu ni devas esti tute kontentaj pri la rezulto atingita? Certe ne! Despli, ke la ĝisnuna publikigita materialo havas karakteron neŭtralan. Ĉu tio ne estas iom stranga en tia gazeto? K-doj SAT-anoj! Bombardu la Redakcion per leteroj petantaj, ke "Monde" informu sian Legantaron pri la Laborista Esp. Movado, t. e. pri SAT. Adreso: "Monde" 50, rue Etienne-Marcel, Paris (2).

Al Naturamikoj-SAT-anoj!

27. marto okazos en Markirch (St. Marie au Mines), Francio, distrikta kunveno de l' Naturamikoj por tuta Francio. La redaktoro de l' distrikta gazeto (La Naturamikoj), kiu aperas en Strasburgo, estas tre favora al esp-o k intencas mem prezenti al la kunveno raporton pri la utilo de esp-o por la naturamika movado. Por garantii nian sukceson, necesas, ke naturamikaj K-doj (organizitaj) el multaj landoj skribu sugestojn, proponojn k konsilojn, faru por- k peresperantan laboron en nia medio. Skribu pere de: K-do Jean Wutte, Oberbetschdorf, Bas-Rhin, Francio.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

AŬSTRIO. Por la Kongreso de l' Socialista Junular-Internacio en Vieno (julio) esp-o estas allasita kiel kongreslingvo. — La socialista urbestraro de Vieno decidis nomi strateton en la dekdua distrikto laŭ Zamenhof. — ASKÖ, la lab. sport-organizo en Aŭstrio, anoncis organizadon de multaj esp. kursoj por la Lab. Olimpio okazonta en 1931 en Vieno. — **GERMANIO. Dresden.** En la jara ĉefkunveno (10. 1.) K-do Szcepanski raportis pri la pasinta jaro. Estis konstatebla kresko de l' membraro, sed ne kreskis la sennaciisma ideo. Pliprofundigi ĝin inter la membroj estas celo de l' nuna jaro. Niaj kunvenoj komenciĝas nun je la 19-a h., ĉiun 1-an ĵaŭdon de l' monato, en popoldomo. Estis elektata kiel peranto K-do Szcepanski (2611), vicperanto K-do Haseloff (5827). En 7 kursoj de LEA-grupo estas instruataj pli ol 100 p. (2611). — **SOVETIO. Sebastopolo.** Esp-o bone progresas. Partiaj k sindikataj organizoj forte subtenas nian esp. komitaton. Tiun progreson ni ĉefe ŝuldas al Sekcio por Internacia Interligo, kiu nun oficiale funkcias ĉe "Majak Komuni" k Soveto de Sindikatoj. Preskaŭ en ĉiuj ĉefaj kluboj funkcias pagataj kursoj (al instruistoj la kluboj pagas 3 rubl. po lekcio).

Kamaradoj! Komence de febr. ni aranĝos nian

unuan esp. ekspozicion

Ni petas vin sendi al ni materialon, PI, ĵurnalojn, gaz. ktp. Rekompence ni sendos PI de Odense. **Odense-a Lab. Esp. Grupo,** Kancellivej 25, Odense, Danio.

FERVOJISTOJ ĉiulandaj!

Skribu pri sindikatmovado vialanda, vivo de gelaboristaro, IRH-laboro ktp. Adreso: **Sverdlovsk,** Ural, Sovetio, Administrejo de Perm-fervojo, A. G. Kovin.



Klubo de Fervojistoj

de Kazanskaja, Oktjahrskaja, Severnaja fervojoj unuiganta 20 mil sindikatanojn dez. korespondi kun ĉiuj landoj pri diversaj temoj. Interŝanĝas PK, L. — Adr.: Klub Oktjabrskoj Revolucii, Kruĵok, esperantistov, Kalancevskaja plosŝad, **Moskvo,** USSR.

Atentu! 1. Koran dankon pro korespondaĵoj senditaj por nia fervojistaro responde al ĝia L pri "11 jaroj de USSR". **Kiu ne jam respondis la L, bonvolu por bono de esp-o nepre respondi** (la ricevitaj leteroj jam estas dissenditaj tra tuta nia fervoja linio). 2. Domaĝe enlitiginta min malsano malhelpas al mi tujan respondon al abunde ricevataj L. Pardonu nevolan prokraston. Post espereble baldaŭa resaniĝo mi tagon post tago al ĉiuj demandintoj nepre respondos.

Samaro. **B. Jeleznjakov** (5583).

Por IRH-ekspozicio

estas tre necesaj el ĉ. l. L, PKI, fotoj, gazetoj, ĵurnaloj pri laboro de IRH-ĉeloj, revoluci-movado, blanka teroro k. s. Sendu abunde! Petu respondon. Adr. Moskvo, USSR, M. Ĥaritonovskij 4, Instituto de Pedag. Plikvalif, ĉelo-Mopr.

Laborista ĵurnalo "Borjba" (Lukto) en Stalingrad

deziras havi eksterlandajn laboristajn korespondantojn el industriaj entreprenoj de **Stockholm, Köln, Berlin, Chicago, Detroit kaj New-York.** — Estas dezirindaj korespondaĵoj pri ekonomia stato de laboristoj, klasbatalo, vivo de laboristoj ktp. — Adresu: Al K-do Kasperski aŭ al K-do Bronin, Moskovskaja, 14, Stalingrad, USSR.

K-doj

a) Aleksandro-Belov el Leningrad, ĉu vi ricevis miajn L k PI?
b) René Lecarme, Comblain-au-Pont (Belgio), mian L (kun 250 PM)?

Bonvolu baldaŭ respondi!

PETO AL RUSAJ ESPERANTISTOJ

Paŭlo Gerö, 23-jara, budapeŝta hungara civitano, maŝinseruristo, en junio de 1926 vojaĝis en USSR al la kongreso de SAT kaj ricevinte okupon li restis tie. Lia lasta letero, datita de 10. 2. 1927, ankoraŭ montris la adreson: Leningrad, Polustrovsky Prospekt 59 kv. 7. De tiam nenia sciigo alvenis de li. La subskribinto kaj lia patrino petegas al la rusaj esperantistoj por bonvolaj informoj pri li aŭ pri lia sorto. Adreso: Lilly Gerö, IX. Gr. Haller u 6. 2. 7, Budapest, Hungarujo.

Internacional-stenografio

en ĉiuj lingvoj. Gvidilo por Esperanto 1 mk. g. + 10% sendkostoj. Gvidilo en aliaj lingvoj.

Instituto de Internacionalstenografio Duisburg, Friedensstrasse 79, Germ.

Krom tio kursoj funkcias en Marfabriko, Trambrigado, en 3 lernejoj, 3 pionirtaĉmentoj, ĉe kursoj de librotenado. Ĉe Soveto de Sindikatoj funkcias tuturbaj kursoj. De 15. 9. 28 estis aranĝataj 19 propagandvesperoj, kiujn vizitis 2928 p. Konstanta ekspozicio de korespondmaterialo kun ekspozicio de murgazetoj estis vizitata de proks. 50 000 p. Nun la ekspozicio estas transportita en Urban Soveton, kie okazas partia konferenco. La 8. Kongreso de sindikatoj, partia konferenco akceptis tre favorajn rezoluciojn por esp-o k realigis ilin en sia laboro. La loka ĵurnalo "Majak Komuni" rezervas specialan "intern. anguleton" por peresp. leteroj. "Ruĝa Nigramarulo" k Krimea ĵurnalo "Ruĝa Krimeo" ankaŭ volonte presas nian materialon. (3632.)

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":
Strahdneeku Arvise, Liepaja, 5. 1. (notoj el 220, 221); Deutsche Kurzschrift, Duisb., jan., Ni k stenogr. (215); Darbs u Maise, Riga, jan., E. Izgur (215).

Prieesper. artik. k notojn enhavis:
Las Noticias, Barcel., 30. 12., 6. 1.; Signalen, Stokh., 10. 1.; La Dépêche, Grenoble, 5. 1.; Le Travailleur, Grenoble, 5. 1.; Monde, Paris, 12. 1. (esp. k radio), VOKS, Moskvo, 22. 12., n-o 50/51; L'Humanité, Metz, 9. 1.

Peresper. materialon enpresis:
Travail, Lyon, 12. 1.; Ecole Emancipée, Saumur, 13. 1.

NIA POŜTO

343. — Bonvolu legi en la Protokolaro de l' VIII. SAT-Kongreso la tekston de konvencio, kiu difinas la rilatojn de nia Asocio kun la LEA k vi sendube bone komprenos nian sintenadon en tiaj internaj aferoj. E. L,

5294. — Jes, laŭ la tarifo.

Al multaj. — "Plena Vortaro" de SAT aperos nur post 8—10 monatoj. Legu "S-ulo"-n.

3632. — Se vi volas pagi viajn anoncojn per akcioj tiam necesas resendi ilin.

Segal. — Pakaĵeto de kovertoj revenis.

Per legado vi lernas . . . Legu regule . . .
Abonu la semajnan legaĵon — "S-ulo"!

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

BULGARIO

K-do Kostadin Georgiev (meblolaboristo), str. Dorostol, 28, Plovdiv dez. interŝ. L, PK, PI, kĉl.

GERMANIO

K-do Reinhold Puhahn (sportulo), Prenzlauer Allee 221, Berlin NO 55, petas K-dinon Zosio Kashlinska en Leningrad sendi ŝian adreson. L. sendita revenis.

— Serĉas koresp-adon en Portug., Francio kun K-doj scipovantaj anglan pri prol. k a literaturaĵoj, interŝ. gaz., ĵibrojn. Adr.: Ch. F. Hochhäuser, postlagernd, Breslau 5.

— 14 geknaboj (13—14 j.), dez. koresp. kĉl., krom Sovetio. Skribu al K-do R. Graetz, Waldemarstr. 17, Rostock.

— Lab. Grupo en Hanau dez. koresp. kun Gek-doj en ĉl., pri ĉ. temoj, interŝ. PM, gaz. Skribu al: Karl Käbig, Gärtnerstr. 77, Hanau a. M.

K-do Kurt Zschuckelt, Lange Str. 14, Riesa-Weida i. Sa., dez. koresp. kĉl. L, PI. Resp. garantiata.

SOVETIO

— Rondeto esp-ista de Odessa Ŝtata Medicina Instituto dez. koresp. pri div. temoj kĉl. studentoj. Adr.: Odessa, Ŝĉepkina, 18, kv. 3, N. Ĥolm (por esp. rondeto).

— Nutraĵistoj-kuiristoj k domservistoj dez. koresp. kĉl. — Kiev, str. de Korolenko, 33, Dvorec Truda, komn. 82, Sojuz Narpit. Esperanto.

K-dino Nina Nepotrebnaja (19 j.), "Zavod" Marti, 45, Nikolaev, Ukrainio, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK, ĵurn. gaz. ktp.

K-do Juri Tihonravov (20 j.), ul. Belinskogo, 13, kv. 15, Leningrad, 14, dez. koresp. kĉl. krom Germanio, interŝ. PI, urbvidaĵojn.

K-do Eŭgeno Melnik (studento), Teknikumo de Ligilo, Moskvo 66, dez. koresp. kun ekstereŭropanoj. Resp. garantiata.

— La lernantaro de 4-a labor-lernejo, 4-a, Trud. Ŝkola, Kremenĉug, dez. koresp. kun prol. infanoj k junuloj ĉl. L, PK, PI, infan. gaz. ktp. Resp. garantiata .

K-do Zejnal Kulijev, Ŝio-Ĉitadze, 6, Tiflis, dez. koresp. kĉl., L, PK, PI, PM, bfl., esp-aĵo. Mi povas informi pri moroj, vivkondiĉoj de kaŭkazaj popoloj. Resp. garant.

Atentu! Ĉelo de SEU ĉe klubo de konstrulab. dez. koresp. kun samprofesiuloj el ĉl. pri vivkondiĉoj k a div. prof. temoj, L, PK, PI. Resp. garaniata. Adr.: Sebastopolo, Krimeo, Muĉnoj per. 5, Klub Kras. Stroitel, Jaĉejka SEU.

— La ruĝarmeana estro k komsomolano dez. koresp. kĉl., precipe Anglio. Resp. garantiata. Adr.: K-do M. Gol. Modelnij ceh, Sormovo ap. N.-Novgorod.

— 110 junkom. ĉeloj ĉe div. laborejoj koresp. kun junkom. organizoj k individuoj. Adr.: K-do Aptekman S. M., Srednij pr. 39, kv. 6, Rostov (Don).

K-dino M. Panomareva (oficistino ĉe telef. stacio), dez. koresp. pri div. temoj. Skribu al: Rostov (Don), Puŝkinskaja ul. 68 al K-do Marin (por Panomarevoj).

ATENTU!
Ni avertas pri la proksimaj
gravegaj festoj:
23-a de februaro — Tago de Ruĝa Armeo,
8-a de marto — Internacia Tago de Laboristinoj kaj
1-a de majo — festo de laboro.
Ni petas antaŭe prepari kaj sendi al ni salutleterojn, stampitajn kaj subskribitajn de Laboristaj Organizoj. Al la 1-a de majo ni nepre sendos al vi la samon. Helpu al ni disvastigi nian laboristan esper. movadon. — Adreso: **Leningrad, Centro, poŝtkesto n-o 305,** al Labesko.

— Komjunulara ĉelo ĉe konserva fabriko dez. koresp. kun junkom. k junlab-istoj pri viv- k laborkondiĉoj ktp. Resp. garantiata. Adr.: Rostov (Don), Lermontovskaja ul. 54, Konserv. Zavod, Komsomol. jaĉejka.

— Soveto de sendiuloj dez. koresp. kun liberpensulaj organizoj k apartaj sendiuloj. Interŝ. literaturon. Adr.: Sebastopolo, str. de Lenin, 3, Sojuz Bezboĵnikov.

— Metallaboristo de Marfabriko dez. koresp. kun laboristoj el ĉl., prefere kun samprofesiuloj. Adr.: Korabelnaja Storona, str. de R. Luksemburg, 72 al Tredjakov.

— Ĉeloj de IRH en militaj grupoj dez. koresp. kun samspecaj ĉeloj, kĉl. Adr.: Sebastopol, str. de Lenin, 1, al Rajkom Mopr.

— Elektroteknikisto dez. koresp. kun samprofesiuloj. Adr.: K-do Lebedev, Red. de M. R., Labesko, str. de Frunze, 30, Sebastopol.

— Komencanta grupo de Centra Konsumkooperativa Oficejo dez. koresp. kĉl. Adr.: Leningrad, L. S. P. O., Nab. Roŝal al esperanta grupo.

— Esp. Rondeto en Centra Prof. Klubo de Konstruistoj petas geesp-istojn sendi al ĝi div. agitmaterialojn por aranĝota dum jan. esp. ekspozicio en la klubo. La anoj de la rondeto koresp. kun sam- k alilandanoj pri lab. k socia vivo. Nepre resp. Adr.: Leningrad, Krjukov Kan. 12.

En urbo Novoĉerkassk estos unua konferenco de esperantistoj 18. marto kaj leterovespero. Mi petas ĉiujn Gek-dojn sendi L, PK, PI ktp. — Resp. sendube garantiata. Adr.: Novoĉerkassk, Pedagogia Teknikumo, al instruisto Borovskij.

USONO

K-do P. Epifanovich, Box, 47, Internat. House, 500, Riverside Drive, New York, City, dez. koresp. kĉl. k ricevil il. gaz.

Junkomunistoj!

Se vi volas kunligi (per esperanto) viajn junkomunistajn ĉelojn aŭ grupojn kun fabrikaj ĉeloj de junkomunistoj en Moskvo, sendu viajn adresojn kaj unuajn leterojn laŭ adreso: **Moskvo-66,** Str. de Marks N 20, Baumana regionkomitato de WZKSM (ĉambro 53) (Internacia komisiono. Al K-do Moskin).

Atentu, Gekorespondantoj!

La aperigo de korespond-anonco kaŭzis, ke multaj Gek-doj skribis al mi. Bedaŭrinde, pro senlaboreco, ne estis eble respondi ĉiujn. Se denove mi laboros, mi nepre resp.
Simeon Petrov, Sofia, ul. Ŝar Planino n-o 56

Dez. koresp. kun
Kooperativistoj
el ĉ. l. pri praktiko k teorio de koop. movado. Adr.: N-Salda, Tagilska okr. Uralo, Cerabkoop Voroncov Sergej. Al serioza koresp. respondo garantiata. Kaj 2. komencantaj esperantistoj dez. koresp. kun ĉ. l. p. ĉ. t. preferinde kun metalistoj-laboristoj pri vivo kaj kulturo de laboristoj. Adr.: Niĵna-Salda Tagila distr., Ural, Klub metalistoj, al Kr. de esperantistoj. Resp. garantiata.

ENHAVO:

pago
La minaco de Hindio 149
Per kooperado al socialismo . . . 151
Ludovikino Miŝel, la granda ribelulino 151
Parizo, Versaĵo 152
Sennaciula Sporta Paĝo 153
Tra Esperantio, Tra la Movado, Nia poŝto, Korespondado, Anoncoj . 154—56

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)